

“Precize” respondis la Ĉapelisto, ekĝemante. “Ĉiam la tehero, kaj neniam ni havas intertempon eĉ por viŝi la ilojn.”

“Do, vi ĉirkaŭmovas vin?” demandis Alicio.

“Precize” diris la Ĉapelisto “laŭ eluzo de la manĝiloj.”

“Sed kio okazas” Alicio kuraĝis demandi “kiam vi denove revenas antaŭ la unue uzitaj?”

— “Ni ŝanĝu la paroltemon” la Martleporo interrompis, oscedante. “Ĉi tio enuigas min! Mi proponas ke la Fraŭlineto rakontu al ni fabelon.”

“Bedaŭrinde, mi eĉ ne unu povas memori” diris Alicio. La propono ja timigis ŝin.

“Do, la Gliro devas” ambaŭ kriis unuvoĉe. “Vekiĝu, Gliro!” Ili pinĉis ĝin sur ambaŭ oreloj samtempe.

La Gliro malrapide malfermis la okulojn, kaj diris per raŭka, malforta voĉo: “Mi ne dormis; la vortojn, kiujn vi ambaŭ diris, mi aŭdis ĉiujn, ĉiujn senescepte.”

“Vi rakontu al ni fabelon” diris la Martleporo.

“Jes, bonvolu, mi petas” Alicio diris petege.

“Ankaŭ ne prokrastu” aldonis la Ĉapelisto “ĉar, se vi prokrastos, vi nepre re-endormiĝos antaŭ ol fini.”

La Gliro tuj komencis, tre rapidante:— “Estis iam tri fratinetoj, kiujn oni nomis Elnjo,

Lanjo, kaj Tinjo. Ili loĝis ĉe profunda puto.”

“Kion do ili manĝis?” demandoj pri manĝaj kaj trinkaj por ŝi specialan intereson.)

Post du minuta konsiderado respondis: “Ili nutris sin per melaso.”

“Tion ja ili ne povus” Alicio diris ĝentile, “ĉar ili fariĝus malsanaj.”

“Kaj fakte *estis*” diris la Martleporo.

“Kaj fakte *estis*” diris la Martleporo. Alicio penis imagi al si, kiel vivo, se ŝi loĝus en putfundo kiel la Ĉapelisto, sed la peno estis troo. Ŝi demandis: “Kial ili loĝis en tiu puto?”

— “Prenu pli da teo” diris la Martleporo, kun tre serioza mieno.

“Ĝis nun mi havis neniom” Alicio ofendite, “sekve mi ne povas preni pli.”

“Denove vi malpravas” Alicio diris. Ĉapelisto. “Ĉu vi ne devis diri pli preni *malpli*? Tre facile ja eblas havi neniom.”

“Neniu petis *vian* opinion” Alicio diris indignante.

“Ho, ho!” triumfe kriis la Martleporo. “Nun rompas la regulon pri preni pli.”

Al tio Alicio ne povis trovi pli da teo. Sekve ŝi servis al si teon kaj